



manashi
dasgupta

dormanta
hejmaro

FEL

Dormanta hejmaro

Dormanta hejmaro

Manashi Dasgupta

Dormanta hejmaro

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo
n-ro 29 en la serio "Stafeto"



Tiu ĉi prov-libro rajtas esti libere kopiita kaj transdonita al ĉiu ajn.

ঘুমন্ত ঘরবাড়ি

ghumonto gharbaari

মানসী দাশগুপ্ত

Manashi DasGupta

Antaŭparolo

Ĉiam estas sanige tiri sin el la banala ĉiutaga vivo por kelktage ferii en alia etoso, kie oni devas adapti sin al ĉirkaŭo tute nova: la mirvekaj detaloj, jen kaj jen iom ŝokaj, stimulas la nervan sistemon kaj agas kvazaŭ lave al menso, kiu sen tio dronus en rutino. Se vi estas eŭropano, amerikano aŭ orienta aziano, kaj sentas bezonon travivi tian renoviĝon, se vi deziras foje transflugi al mondo tute malsama ol tiu, en kiu disvolviĝas via vivo, se plaĉas al vi flari novajn odorojn, aŭdi novajn sonojn, pasi de enirejo al verando, kaj de ĉambro al ĉambro en domoj aranĝitaj laŭ plano por vi surpriza, aŭ transiri de paca kampara ĝardeno al sufoka strato plenplena je milionoj da preterpasantoj, se allogas vin la ideo malkovri nefamiliaran universon, kie homaj reagoj aperos kompreneble strangaj, sed strange kompreneblaj, jen romano por vi.

Ĉi tiu libro estas, iel, majesta. La rakonto ne evoluas laŭ okcidenteca kadenco. Ĝi fluas kiel Gango, malrapide, potence. Ĝi havas la imponan ritmon de filmoj el Barato, kiujn oni spektas sciante, ke oni disponas tempon kaj povas permesi al si la lukson senstreĉe progresi. Kaj tamen ĝi estas niatempa. En la ĉirkaŭaĵo, kie agas la roluloj, vi retrovos multajn aspektojn de la vivo en industria lando (eĉ se de tempo al tempo, en la kvartalo, kie vi troviĝos, paneos la elektro kaj varmo premos neelporteble).

Ke majestas la rakonto, tio ne signifas, ke vi penetros en palacojn maharaĝajn. Kaj ke ĝi estas niatempa, ne implicas, ke vi kundividos la vivon de la Kolkata senhavularo. Diversajn sociajn mediojn vi ekkonos, sed ne ekstremajn. En ĉi tiu por vi verŝajne neordinara mondo, vi renkontos homojn tute normalajn, diferencajn nur kulture. Sed tiu diferenco estas grava, kaj instrua.

Komence, vi eble perdiĝos ekvidante tiom da personoj kun nomoj, kiuj malsimilas al ĉiuj de vi konataj, kaj kiujn via memoro eble malvolos registri (tial povus esti saĝe akompani vian legadon, almenaŭ en la unuaj ĉapitroj, per papero, sur kiu vi notos la nomojn de la aperantaj roluloj, kaj ties kompleksajn rilatojn). Vi ja envenos en vastajn familion kaj amikaron, kie ĉiu rolas sian personecan rolon, sed en kiu vi, manke de familiareco

kun la loka etoso, eble nur pene orientiĝos.

Multo vibrigos vin. Kortuŝos vin la travivaĵoj de la virinoj, kaj la psika malsano de Moniŝankor. La politika konvinkiteco de Franjo Priti povos pinĉi fibrojn en via animo. Kaj vi vin demandos, ĉu vidi en juna Ŝontu fian orgojlulon, kiu, ŝajne miskredante, ke la mondo apartenas al li, permesas al si fari ion ajn sen eĉ eta konsidero al la aliuloj, ĉu trovi lin simpatia, kompatinda knabo trapasanta adoleskon en malfacilaj cirkonstancoj, kaj faranta nur tion, kion la premoj de la vivo iel trudas al li. La gamo de eblaj reagoj estas larĝa, same kiel la diverseco de la roluloj.

Kia ajn vi trovos la substancon de la libro, ĝia lingvaĵo nepre vin interesos. Kiagrade ties originaleco, kaj beleco, ŝuldiĝas al la fakto, ke temas pri traduko el la bengala, kiagrade al la talento de la tradukinto, mi ne povas distingi, sciante nenion pri la lingvo, en kiu la libro estis origine verkita. Sed se vi esperas vidi konkrete, kiom esprimriĉa estas Esperanto, kiel ĝi adaptiĝas facile, senpeze, al ĉiuj esprimbezonoj, kiom da neatenditaj vortjuveloj latentas en ĝia vortprovizo, vi ne elreviĝos. Neniam, ĉi-romane, nova neologismo blokos vian komprenon; kaj tamen la lingvaĵo estas ege riĉa: multaj originalaj vortoj, arte kunmetitaj el la radikoj de la ordinara lingvo, admirindas ĉar unike kaj mirind-esprime ĉizitaj.

Malbanala ĉi tiu romano estas, kompare kun tio, kion ĝenerale prezentas la esperantlingva verkaro. Vi kuraĝe eku al ĝi, kaj persistu post la unuaj paĝoj, en kiuj la nombro da personoj povus fortimigi vin. Indas transiri tiun sojlon kaj plonĝi en la rakonton. Ĝi mense riĉigos vin.

Claude Piron

Postskriba noto de la tradukinto: Legantoj, kiuj sentos necesa ian "mapon" de la roluloj, trovos ĝin sub la vorto Agantaro en la librofinaj Notoj. Tiun liston ili eble notu sur slipon uzotan kiel legohelpilon.

Antaŭ la domo

Franjo Priti ricevis ĉi-jare la premion Ratnaaboli pro sia unua libro en la bengala, *La Hele Esperaj Tagoj*. La premio trafas indan stiliston. Verkas memoraĵojn multaj. Sed aperigi la veran historian valoron de memoraĵa dokumento — ĉu multaj tion sukcesas? Franjo Priti ja sukcesis. Unika ŝi estas.

La etoson de tiaj vortoj, kaj karton invitantan al la premia solenaĵo, portis Rotiŝ li aspektis sufiĉe kontenta. Ilia nova apartamento, kvankam negranda, estas efike aranĝita. Oni ĉion faris laŭ la gusto de Rotiŝ multaj geamikoj kune pensis pri la planoj; kompreneble, ke ĉio impresas nove, bunte. Ankaŭ la feliĉo surhavas novan bunton en tia loko, se gaje parolas Rotiŝ. Li aparte vokis Lolitaan kaj rakontis al ŝi pri la sukceso de Franjo Priti. La reaga kunrido de Lolitaa ial alihumorigis Mollikaa. Kial, se tiel luma la nokto?

En tiu alia nokto, tamen, ne estis lume. Oni ja aranĝis kun la servisto Raamdhan, ke restu nefermita la ekstera pordo. Sed Mollikaa, kiu preskaŭ fantome enpaŝis, trovis sin vidalvide al Lolitaa. Sur la malluma korto, rekte sub la ĉielo staris Mollikaa, Lolitaa — kaj sukcesis interŝanĝi iajn vortojn, ĉu? Ne plu memoreble. Ne memoras Lolitaa. Ŝi estas ridanta. Lolitaa, kiu ĵus aŭdis pri la memoraĵa verko de Franjo Priti, ridas. Ĉu Mollikaa do ploras? Ne. Ankaŭ tiam ŝi ne ploris, ĉu ne. Poste pasis tiel longe. Tiom da mortoj, kaj da forgeso. La “tagoj” restas en la memoro de Franjo Priti. Kiel deca ŝi estas! Mollikaa memoras la noktojn, nur la noktojn.

Tiun nokton, iri kun Probhaaŝ, kvazaŭ oni kaŝe forkurus ien. Per kiaj strangaj vojoj, kiel malproksimen rapidis la taksio. Poste, je la ĝusta momento, lasi ĝin sur la ĉefa strato kaj piediri tra la flankstrataro. Tamen ne eblis ekvido de Ŝontu. Nur restis tie, fore, kelkaj mute mortaj korpoj, kiel forlasitaj bestoj, kun la vizaĝo suben. Ĉu inter ili Ŝontu? De kiu patrino filoj ili, de kiu fratino fratoj, kies amikoj? Mollikaa ne povis iri rigardi. Fortike tenis ŝin la mano de la retrovenanta Probhaaŝ. Tielege fortike, kiel tenis la fenestrojn kaj pordojn sentrue ŝlositaj la apudaj domoj — kvazaŭ ĉiuj dormus en noktomeza ŝtipeco. Ne ekzistas atestantoj.

Scias neniŭ, kio okazis, okazas.

Stari antaŭ ĉi tiu duone malkonstruita domo ne plu plaĉis al Raĝoteŝ. Ankoraŭ malpli li ŝatis la senvortan staradon de sia patrino. Kial ne volis akompani lia pli aĝa kuzo, tion nun Raaĝu, aŭ Raĝoteŝ, senmanke komprenis. Li tre malakre frapis sur la brakon de Mollikaa kaj petis, “Panjo, ni do ekiru nun, tuj venos la konstruaj laboristoj.”

Elirinte el la silento, Mollikaa volis ŝajnigi seninterrompan atenton: “Ili venu do ja!”

“Sed Panjo, vi diris ĉu ne ke vi nur iomete rigardos kaj tuj reiros?”

“Pri iometo temas ja. Se ne venos la konstrulaboristoj, kiel do ni atingu tiun ĉambron sur la unua etaĝo?”

Raĝoteŝ priridis tiun personon: “Sed ili ne helpos pri tio. La ĉi-flankajn ŝtupojn oni jam tute malkonstruis, ĉu vi ne vidas?”

Sen perdo de la rideto, Mollikaa tamen staris tie plu. La embarasiĝon de Raaĝu ŝi ja komprenas. Ili mem malkonstruigas sian domon per evoluigisto. Ne decas tiamaniere antaŭstari antaŭ tiu loko dum la laboro daŭras. Tion ankaŭ Mollikaa konscias. Tamen, kiam oni afiŝis anoncojn pri la vendo de la grandaj, malnovstilaj fenestroj kaj pordoj, tiun tagon ŝi petegis sian nevon. Manaa do akompanis ŝin tien. Ŝi do revidis la domon. Ĉu jen tiu domo?

Kiam Rotiŝ priaŭdis, li lakone reagis: “Kaj kial vi de tempo al tempo subitas tien? Oni ĉion forbalau kaj faru la multetaĝaĵon. Nia propra apartamento pretiĝu. Poste ni rekte instaligos, ĉu ne? Kial antaŭ tio viziti la lokon entute?”

Tio indikas do, ke Rotiŝ ne forgesis, ke baldaŭ post la forveno, Mollikaa pretekstis butikumi kun Manaa en la Bazaro Srimaani kaj veturis laŭ la Voĵeto Srinaath Daaŝ du-tri fojojn. Manaa ridis dum li rakontis al Rotiŝ en la ĉeesto de Mollikaa mem: “Onklino diras al mi, ‘Ĉu vi vere lernis lerte stiri? Pilotu do laŭ tiu ĉi vojo ankoraŭ unu fojon!’ Pri tia butikumo temis, baf!”

Ĉiuj ridis, do bone ja. Kiel skribis Franjo Priti, estis tagoj de hela — hela

kio? Ĉu hela lumo? Ne, ne pri lumo temas.

Raĝoteŝ denove pledas: “Estas malfrue, Panjo. Ĉi-matene mi devas ĉeesti lecionon.”

Eble pli bone farus Mollikaa, se ŝi venus sola. Tiun ĉi distanceton de la strato Prinsep ŝi fakte konas jam. Kial tamen ŝi volas veni kun sia knabo? Kun siaj knaboj?

“Momenton, sur tiu korto ene ni iom staretu foje.”

“Kion ni do farus, Panjo, en tiu fatraso de sablo, kalko, rubaĵoj?”

Al la vizaĝo de sia filo Mollikaa ĵetis etan rigardon. Raaĝu estas jam tro granda por ke ŝi subite alparolu lin per karesa “Tublu”. Eĉ volante klarigi al Raaĝu, ŝi tial ne povis do klarigi, ke kvankam nenio nun fariĝos tie, ŝi tamen volas foje paŝi al la pasintaĵo, kiu tie iam efektivis, por ke ŝi vidu, ĉu denove venos al ŝi voko de Ŝontu. Probhaaŝ diris tiufoje, “Jam tro malfrue, do.” Eble pelas ŝin tiu vorto. Mollikaa malfruis en tiu tago. La perdita tempo ĉasas sin, prede pelas ŝin ĉi tien. Tien, kien venis iam Ŝontu, venis nur por perdiĝi. En la memoro de Franjo Priti, li malĉeestas. Li malestas. Post dudekduo da jaroj, eĉ la domo mem forviŝiĝas. Bone do ja. El ia penso Mollikaa diris al Raaĝu, “Mi iam elektis por vi la nomon Kunaal, ĉu vi scias? Tiam, el tiu —”

Unu

Eldormiĝante en la frua mateno de la deksepa de julio mil naŭcent sepdek, Ŝontu sentis, ke li tre grandiĝis. Efektive estis lia datreveno hieraŭ. Jen la plej amuza afero. Li tion ekmemoris nur nun. Lian datrevenon forgesis ankaŭ Panjo, ĉu ne? Post kiam ili forvenis de Palaaŝpur, neniu el ili sukcesas memori ion. Eble pro la forveno el Palaaŝpur, el Frondoz-urbo, Ŝontu tiome kreskis.

En ĉi tiu kvartalo, la sinjorega flanko kaj la sinjoreta interbatalis hieraŭ nokte: temis pri relative banala, bomba-pulva renkontiĝo pro iu demando de partiaj afiŝoj. Ŝontu estis endorme en tiu tempo ja. La aero ne plu odoras je malamikeco nun. En la tagiĝa horo, la aeron oni sentas tre malpeza. Se troviĝus ie floroj, la vento portus ilian odoron. Sed nenie estas floroj. Ŝontu rigardis tra la fenestro kaj la ĉielo impresis al li nube. Sed li elvenis sur la verandon kaj vidis, ke ne pri nuboj temas. Oriente troviĝas kvaretaĝa domo. Ĝia malantaŭa muro, kun reliefaĵ brikoj, staras kiel ia giganto, kiu premas sur ĉi tiun hejmon, kaj forglutas la tagan lumon. Ŝontu rimarkis tion, kaj fariĝis aliatenta. Hieriaŭ ili envenis ĉi tien en la vespero. Tiam ĝuste tiu feroce kolerema muro aspektis glora kiel fortikaĵa fasado, kaj apud ĝi la elektraj lampoj donis etoson de festo en tuta komunumo. Ili ja venis ĉi tien hieraŭ, for de la avino, por ne plu resti ĉe ŝi sed resti kune kun ĉiuj, hieraŭ vespere. Jen la unua ektago nun. Kiom da malsamo inter la tago kaj la nokto, tiom da malsamo! Kiam ajn li volas, li povas forigi tiujn ĉi malsamojn; li nur ne volas.

Lia patrino Lolitaa estis irinta suben por sin bani. Nun ŝi revenis al la verando, surdrate sternas la malsekan sarion, kaj demandas: “Ĉu ellitiĝis Manaa?”

Ĉu Panjo memoras? Ĉu ŝi ekmemoris? Li sentas, ke ne.

Pro lia silento, Lolitaa turnas la vizaĝon al li: “Ĉu io ne en ordo?”

“Nenio. Manaa ne ellitiĝis ankoraŭ.”

Lolitaa proksimiĝis al la filo. La vizaĝo de Ŝontu fojeton frotiĝis kontraŭ ŝi. Li vidas, ke ŝi ne ekmemoris.

Tiam ĉi, elvenante de la apuda ĉambro, surmetante subĉemizon, aperis Rotiŝ: “Ĉu oni karindumas? Bofranĵo, ĉu vi do dorlotas la grandan knabon? Vidu ja foje mian alian duonon, s-inon Mollimoŝtino, nu efektive, se tiu knabeto eĉ unu fojon tro alpatrinas, punkto, fino, vi vidos la sekvojn. Eĉ la patro de tiu filo atenton ne rajtas ja.”

Pri la patro de la filo Ŝontu ne havis ion por pensi. Sed li ja cerbumis, kiel la tre eta filo de lia onĵo irus mem al iu, kiu ne decidus mem venigi lin proksimen. Dum li cerbumis, Ŝontu sentis sur sia kapo la manon de Lolitaa. Sed ŝi daŭrigis la konversacion kun Rotiŝ.

“Ne forgesu, Bofraĉĵo, demandi pri la lernejo. En la oka klaso li lernas. Tre malfacile, oni diris al mi, je tiu aĝo subite enŝovi en lernejon ĉi tie. Tial mi jam skribigis atestilojn —”

Rotiŝ ŝajnis iom ironii: “Ĉu per tiuj ekleziaj patroj?”

Embarasite, Lolitaa klarigis: “Ne, mi celas nur, ke li fojfoje rangis unua. Ĉiuj ĉe tiu klaso, liaj instruintoj, sciis ja, kiel li mem okupiĝis pri siaj kursaĵoj, sen ies helpo.”

Ŝtuparante suben, Rotiŝ klarigis al ŝi: “Sed nun mi ne iros al tiuj kvartaloj, Bofranĵo. Mi nun, vidu, iras al entute, nu bone, aliaj farendoj. Donu al mi tiujn viajn paperojn nur kiam mi iros al la lerneja kvartalo. Alie eble ili perdiĝos aŭ tiel plu.”

“Jes ja,” diris Lolitaa, “sed bonvolu memori preni ilin, kiam tien vi ekiros.”

Ŝontu demandis, “Al kiu lernejo mi aliĝos, Panjo?”

“Al bona lernejo. Vi vidos, kiajn bonegajn instruistojn kaj amikojn vi havos.”

“Ĉu troviĝas ĉi tie pli bona lernejo, ol en Palaaŝpur?”

Ekridis Lolitaa: “Stultetulo! Bona lernejo en Kolkato ne estas simple ajnaĵo! Por studi oni ja venas al Kolkato.”

Nur kuspiĝis al Ŝontu la nazo. Lia koro restas kroĉita al Palaaŝpur. Ĉu tion ekkomprenis Panjo? Hieraŭ, parolante dum la tagaj horoj al sia

patrino, Panjo ridindumis kaj ŝajnigis kvereleti, interalie dirante, “Ĉu do estas por ni eraro veni al Kolkato!”, kaj vekis fortan esperon en Ŝontu. Oni do reiros al Palaaŝpur, ĉu? Tamen ne. Jen Kolkato. Estas Kolkato ankoraŭ. Multe rakontis pri ĝi Panjo. Ankaŭ multaj aliaj. Kien ajn oni veturu, ĉu al Delhio aŭ al Mumbajo, ĉie en Barato bengalo, kiu rekonas bengalon, nepre priumas pri Kolkato, ĉu ne? Ju pli longe oni foras de tiu urbo, des pli oni interparolas pri ĝi. Panjo diradis do, Kolkato, Kolkato. Ĉu kunveno, ĉu geedziĝo, ĉu publika diservo, nepre Kolkato. Jam hodiaŭ Ŝontu povas foriri al Palaaŝpur; li iros eble ne tiel tuje, sed li jes iros.

Lolitaa maldraste puŝis lin, dirante, “Iru lavi la vizaĝon kaj pretiĝi. Ĉu baniĝi vi volas? Matenbane, por la netec’?”

Ŝontu kapneis pri la bano. Sed li tuj iris lavi la vizaĝon. Lolitaa aldiris averte, “Singarde eniru la banejon, estas tre muske tie.”

De sube ŝin aŭdis Bibhaaboti, kiu reagis: “Kie estus muske? Jam hieraŭ mi uzis karbopulvoron por purige lavi tie. Post tiom da frotado miaj piedoj sentas ankoraŭ la akrecon.” Kaj Bibhaaboti rigardon ĵetis al Mollikaa. Tiu verŝadis la lakton por sia filo de unu bovlo al alia kaj reen por ĝin malplivarmigi. Ŝi atente daŭrigis tiun laboron, senreage. Ne klaras, ĉu ŝi timas sian bopatrinon; sed ŝi ŝin evitas. Ŝi ne emas implikiĝi kun ŝi. Se temas pri Lolitaa, Mollikaa antaŭe spertis ŝin dum tri-kvar tagoj tempe de sia propra edziniĝo. Surhavante akre ruĝan kaj pezasilkan sarion, portante enmane dolĉaĵon kaj maĉan betelfolion, Lolitaa promenis same ruĝe kaj tenere kiel sia multekosta sario — homo senlaŭta, rafinita. Etan sekvantaron ŝi havis, eĉ tiu tagokelko tion montris klare. La informo, ke ŝia vizito daŭros nur kvar tagojn, malfeliĉigis Mollikaan: “Kio malhelpas resti iomete pli da tagoj?”

“Malhelpas via Bofrato. Li ne estas ŝovebla for de sia aferistado. Multe oni devis diri, klarigi, marĉandi por ke li venu ĉi-foje kun mi. Se mi rompos mian promeson kaj malfruos reiri, tiam lin mi ne plu povos miadire venigi. Vi ja ne konas ankoraŭ ilian tipon.” Kaj ŝi klarigis kun rideto: “Tia persistemo tamen vere endas, ĉu ne. Sen la laboro oni eĉ ne unu tagon povas manĝi. Ne plu oni rajtas esti biensinjoroj. Bele estus en tia aranĝo, ĉu ne? Tiam vi povus senĉese disponi ... mian bofraĉjon?”

Forte ridis Lolitaa. Estis ja ridveka ideo, tiu. Jam tiutempe Mollikaa tion

perceptis, kaj nun des pli. Pro la eksa biensinjora kutimiĝo, sinjoro Nittaaonondo efektive eterne restis aristokrate ensalona sidisto. Ĉu tio donacas al sinjorino Bibhaaboti eternan paranecon lian? La tuta senkapabla maljunularo de la mondo regule vizitas Nittaaonondon. Se oni eble povas tamen elteni la senfarecon ĉe maljunulo, kion oni pensus do, se juna viro sidus senfare kaj moŝte por kartoludi? Naŭze!

Rotiŝ rigardas ŝin foje kaj elrapidas. En banko li laboras. Ne temas pri aparte gratulinda posteno. Rotiŝ deklaras ofte, “Ĉio ĉi ŝanĝiĝos ja, ĉu vi opinias tiun ĉi socion eterna?” Kiel ajn estu pri tio, la tutaĵo de oficejo, liberaj tagoj, strikoj, mitingoj signifas por Rotiŝ regulan bezonon elhejmiĝi. Jen granda savo. Pri ĉio ĉi oni povos ĉi-foje babili libere kun Lolitaa, Mollikaa estis supozinta kun entuziasmo: post tiel longe venas la Kunfratino! Dio! Pli bonas ol la aferistado de ŝia edzo tia ĉi oficeja deĵorado. Ĝi almenaŭ povigas viziteti foje la parencojn. Ja por la homo estu la enspezo, ne por la enspezado la homo.

Ke ŝi multon tian eĉ verkis tekste, ke la publiko jam konas Mollikaan, neniom de tio direblas nun al Lolitaa, tamen. Ne plu temas pri tiu sama Lolitaa. Ĉu povas tiom ŝanĝi homon trio da jaroj? Maldika ŝi iĝis, iel mankas la haŭta helo, eĉ la vizaĝon okupas la senĉesa predado de akuta pensego, kiu tute ŝanĝis la mienon. Mollikaa trovis Lolitaan eĉ pli bela ol antaŭe. La impresado de senĝene vivanta edzino de prosperulo, kiu ŝirmas ŝian teneron, forfalis de Lolitaa. Perdinte la amemon vartitan de la abundo, Lolitaa fariĝis iel seke akra. Ekde hieraŭ Mollikaa sentas sinĝenon alparoli ŝin per la kutima “Fratino!” Sed Ŝontu estas muldita laŭ la mola ombro de tiu malnova Lolitaa. Tial Mollikaa sentas la emon brakumi Ŝontun, kiam ŝi vidas lian maldrastan rigardon. Kvankam multe pli aĝa, Ŝontu restas pli tenera ol eĉ Manaa.

Bibhaaboti ekkoleris: “Kiom pli vi volas senvarmigi la lakton? Ĉu ŝtone glacian lakton oni verŝu en la gorĝon de etulo? Tiel longe vi atendis lian alvenon. Nun vi devus lin vere varti.”

Mollikaa haltigis siajn pensojn. Ŝi foriris kun la laktobovloj. Tiam ĉi Bibhaaboti atentis al Ŝontu: “Kio estas al vi, ke vi simple lavis vin kaj staras? Vi devus manĝi, ĉu ne? Kie estas via patro? Ĉu li restas enlite?”

“Paĉjo? Li jam eliris.”

Kun miro, Bibhaaboti diris, “Ĉu li eliris jam tiel frue? Eĉ sen manĝeto? Mi ja ne vidis lin ekiri. Jam de la korvograka fruo mi staras tie ĉi, kiuvoje do li iris kaj kien? He Raamdhan, Raamdhan —” ŝi komencis voki la serviston.

La dentoj de Ŝontu firmis sur lia suba lipo. Verdire ankaŭ li ne vidis la eliron de Moniŝankor. Li sciis, ke en la ĉambro, kie dormis li mem, troviĝis Paĉjo sur la alia lito, kaj ke li nun ne troviĝas. Ĝuste ĉe tiaj netroviĝoj komenciĝis la problemoj en Palaaŝpur. La subitaj eliroj de Paĉjo, ien, treege frue en la mateno. La unuan fojon, Panjo vokis kaj puŝis Ŝontun veka kaj demandis urĝe: “Ŝontu, ĉu via patro diris al vi, kien li iras?”

Pro la tiel frua abrupta eldormiĝo, Ŝontu restis tiel konsternita, ke longe li ne komprenis, kion oni volas scii. Sed poste li ne malrimarkis, ke pri tio daŭras ĉe Panjo la pripensego, la malgajo, eĉ ĝisplure. Tiu fina forveno al Kolkato, ankaŭ tio okazis tial ĉi.

Vidu, kian varman matenon ni havas!

Du

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Tri

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Kvar

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Kvin

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Ses

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Sep

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Ok

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Naŭ

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dek

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dek unu

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dek du

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dek tri

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dek kvar

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dek kvin

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dek ses

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dek sep

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dek ok

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dek naŭ

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dudek

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dudek unu

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dudek du

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas
aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dudek tri

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dudek kvar

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dudek kvin

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Dudek ses

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la romano, kiu estas aĉetebla de www.retbutiko.be aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

Notoj kaj glosoj

(suplementajn serĉojn oni faru rete)

Agantaro de la romano, ĉi tie prezentita laŭ parencecoj (la egaleco-signo “=” indikas geedzecon; la streko “/” indikas plurnomecon de unu persono, ĉefe pro la ofta uzo de karesnomoj en kaj ekster la familioj): Mollikaa = Rotiŝ, ilia filo Tublu/ Kunaal/ Raĝoteŝ iliaj servisto Raamdhan, ŝoforo Kabir. Rotiŝ estas kuzo de Moniŝankor, = Lolitaa, iliaj filoj Suĝon/ Ŝontu kaj Sumon/ Manaa. Rotiŝ estas filo de Bibhaaboti = Nittaaondo; diversaj geamikoj iliaj: Ŝormilaa = Ranen, Goŭtam, Srilekhaa/ Ŝirin, Biraam, Priti, Probhaaŝ.

Ajurvedo (priserĉu rete sub la formo **Ayurveda**): la antikva barata kuracarto, nun uzata en formo akceptinta la kutimajn kompromisojn kun aliaj sistemoj.

Barato, multlingva respubliko, antaŭe nomata Hindujo, Hinda Unio, kaj evitinde “Hindio” (la hindia lingvo estas nur unu el la dudek tri oficialaj lingvoj de Barato, pro kio necesis – temas pri la naciaj Esperanto-kongresoj nompropona, de 1982, kaj konfirma, de 1998 – emfaze ŝanĝi la Esperantan nomon de la malnova “Hindio” al la nomo “Barato” bazita sur la barata nomo “Bharat”, pri kiu oni faru retajn serĉojn). Barato, Pakistano, Bangladeŝo formiĝis el lando, kiu ĝis 1947 estis unueca ento, kaj por kiu la prihistoria lingvouzo konservas la nomon Hindlando, same kiel ĉe la Hinda Oceano, la hindeŭropaj lingvoj, Hindoĉinio k.s. La guberniaj nomoj Bengallando, Guĝaratlando, Panĝablado ktp bezonas komentarion. Pro la ekzisto de lingvanaraj etnoj, la Esperantaj kutimoj devigas nin nomi ilin “la guĝaratoj, la bengaloj, la panĝaboj” ktp. Nu, en la barataj lingvoj, la i-finaĵaj vortoj “Guĝarati, Panĝabi” ktp nomas ĉiam la lingvon aŭ la lingvanon, neniam la landon. Tial baratanoj provantaj lerni Esperanton havus apartan malfacilon se oni devus diri al ili ne nur, ke Panĝabo estas ne gubernio sed homo, sed eĉ, ke Panĝabio estas ne homo sed gubernio. Esperanto do prefere evitu la vortojn Bengalio,

Guĝaratio, Panĝabio entute. La modelaj frazoj do tekstu: “Ne ĉiu panĝablandano estas panĝabo, ne ĉiu bengallandano estas bengalo.” En iuj kazoj tion faciligas la historia malsameco inter la gubernia nomo (ekzemple Maharaŝtro) kaj la nomo de la ĉefetno (“ne ĉiu maharaŝtrano estas maratho parolanta la marathan”).

Bendas (alfabete la plej frua ero el la paroj “plendas kaj bendas, diversaj-universaj, libroj-fibroj”): provo prezenti en Esperanto unu stileron de la **bengala** kaj similaj lingvoj. Temas pri la kvazaŭ-sonimita kreo de esprimparoj, kie la unua parero havas sian veran sencon kaj la dua, rima parero pli-malpli signifas “kaj tiel plu”.

Bengala lingvo: unu el la sanskritidaj lingvoj, do parenca al la guĝarata kaj la hindia. La roluloj en la romano ĉiuj denaske parolas la bengalan krom Raamdhan kaj Kabir, kiuj parolas denaske la hindian kaj kromlernis la bengalan. Pri la bengaloj estas ŝablone, ke ili i.a. ŝatas manĝi fiŝojn (tial necesas glosi la vorton **rohuo**).

Bilo: Ekzistas en Barato kredo tradicia, ke longa malsatado igas la bilon el la hepato enfali en la stomakon, apetitodetruo. Temas pri mikso de popolaj komprenoj kun tio, kion oni kaptis el la klarigoj de ajurvedaj kuracistoj.

Cinabro: pulvoro vermiljona, uzata i.a. de ortodoksaj hinduaj edzinoj en multaj partoj de Barato, inkluzive Bengallandon, por marki la edzinan staton. Oni tradicie ŝmiras la antaŭan parton de la hararmeza linio (de kie la haroj kombitas ambaŭflanken) per iom da cinabro pulvora.

Ĉampoj (*Michelia champaca* laŭ unu fonto, *Pulmeria acutifolia* laŭ alia). Bonodoraj oranĝe-flavaj floroj de ĉiamverda arbo, el kiuj oni produktas

oleon en la parfuma industrio. Malnova nomo en la tamila lingvo *canpakam*, de kiu venis la sanskrita *campaka*. En la romana teksto aperas “*campofloroj*” por ne haltigi tie la legantojn ne sciantajn, ke temas pri floroj; se la vorto plikonatiĝos, iĝos preferinde nomi la florojn *campo* kaj la arbon *campujo*.

Durga: diino (edzino de **Ŝivo**) de la forto, unu el la ĉefaj figuroj en la bengala formo de la hinduismo. La adoro de Durga, en oktobro, estas la ĉefa festo de la bengala hindua jaro; la turismaj, donacaj, familikontaktaj planoj uzas tiun feston kiel referencon.

Falguno: vidu “Faalgun” sub Monatomoj.

Frato, Fratino: por multaj baratanoj, kuz(in)o estas speco de frat(in)o. Oni do rigardu la ‘frato’-alparolon inter kuzoj kiel ian tradukan strategion. En unu-du lokoj la komenca majusklo F en Frato, Fratino indikas pliaĝecon.

GeŜormilaa, geRanen: nomi ĉi tiele la paron Ŝormilaa-Ranen eventuale agacas iujn legantojn; ili rajtas pri tio kulpigi Charles Power, kiu infektis ĉi tiun tradukinton per la mikrobo. (Uzindus ĉi tie la reta ridetosigno “:-)”, sed tio en la libroj ankoraŭ ne estas tradicia kaj do restas intercitila incitilo.)

Guĝaratoj: etno loĝanta en la barata gubernio Guĝaratlando kaj parolantaj la guĝaratan lingvon.

Hindia lingvo; Hindlando: vidu sub “Barato”.

Kalidaso, priserĉu rete sub la formo **Kalidasa**: poeto en la sanskrita, kiu vivis ĉ. la 5a jarcento p.K. en la norda-centra Barato; ofte taksata kiel la plej brila inter la sanskritaj verkistoj.

Kolkato (malnovaj nomoj Kalkato, Kalkuto): orientbarata havenurbo, la ĉefurbo de la nuna barata gubernio Okcidenta Bengallando.

Kunfratinoj: virinoj, kies edzoj estas fratoj aŭ kuzoj unu de la alia (en la barata angla, *co-sisters*). La propono de John Wells, bobofratino / bobokuzino, bele utiligas la latentojn de Esperanto, sed aspektas al mi iomete tro “cerba”; certe estas afero de gusto, kaj mi transiros al ĝi, se ĝi “venkos”.

Lumbini: loke komprenebla aludo al la adreso de unu el la plej konataj mensaj malsanulejoj en Kolkato.

Minarego de la Martiroj: en la suda-centra parto de Kolkato, la monumenton konstruitan nome de la brita generalo David Ochterlony (1758-1825) la sendependa Barato redediĉis al siaj martiroj kaj reetikedis “Shahid Minar”. La Esperanta minareto estas specifa, mallarĝa nocio, rekomprenenda kiel svelta speco de minaro; la martira minaro en Kolkato estas sufiĉe granda por meriti la nomon Minarego. En la romantraduko la deziro trafi tuj kompreneblan formon motivas la elekton de la formo Minarego por sugesti kontraston kun la vorto minareto.

Monatnomoj: la diversaj kulturoj de Barato uzas proprajn variantojn de la hindua kalendaro. En la bengala versio, la jaro komenciĝas per la monato Bojŝaakh (ekde la mezo de aprilo), kiun sekvas Ĝoĝŝtho, Aaŝaar,

Sraabon, Bhaadro, Aaŝŝin, Kaartik, Agrohaajon, Poŝŝ, Maagh, Faalgun, Ĉojtro.

Mumbajo (malnova nomo Bombajo): okcidentbarata havenurbo, la ĉefurbo de la nuna barata gubernio Maharaŝtro, la centro de la filma industrio ofte nomata “Bollywood”.

Nakŝalo: barata maŭisto ligita al movado naskiĝinta ekde la sesdekaj jaroj en la urbeto Nakŝaalbaari en la norda Bengallando (priserĉu rete sub la formoj **Naxalbari**, **Naxalites** por la urbeto resp. la movadanoj).

Riŝjaŝringo (priserĉu rete sub la formo **Rishyasringa**): Belaspekta juna asketo en la antikva barata mitologio, filo de cervo kaj homino.

Rohuo (*Labeo rohita*), fiŝospeco trovebla en freŝa akvo, kun malhelaj skvamoj sur la supra parto de la korpo kaj kun ore bruna malsupra parto.

Semolino: pulvorigaĵo el la malfajnaj eroj, kiuj restaĵas, kiam oni muelas la tritikon por fari farunon. El la semolino oni kuiras diversajn pladojn en Barato; en Bengallando temas plej ofte pri dolĉa pasto, nomata ĉi-traduke simple “semolino”.

Ŝarotĉandro Ĉattopaddhae, priserĉu rete sub la formoj **Saratchandra Chatterjee**, **Chattopadhyay** (15.ix.1873-16.i.1938): bengala fikciisto, kies verkoj atingis altegan gradon de akceptiĝo ĉe la legantoj en Barato. Oni tradukis lin en multajn baratajn lingvojn kaj faris sukcesajn filmojn el liaj romanoj. Estis socireformaj kaj patriotismaj tendencoj en liaj verkoj, kaj al tio aludas la roluloj en ĉi tiu romano.

Ŝivo: unu el la tri superdioj en la hindua kosmologio: la kosma ciklo konsistas el la kreo fare de Brahmao, la kreaĵkonservo fare de Viŝnuo kaj la detruo fare de la dancanta, meditema, freneza dio Ŝivo; post la detruo ĉio rekomenciĝas.

Ŝorbi: sorbi ŝerbeton kaj similmetode faritajn trinkaĵojn, do ŝorbaĵojn.

Transskriba sistemo: La malmultaj plene asimilitaj nomoj (Kolkato, Mumbajo k.s.) estas Esperantaj vortoj. Ĉi tiu libro neplene asimilas la aliajn nomojn (detruante iujn fonemajn kontrastojn, ekzemple inter retrofleksaj kaj dentaj sonoj). La ĉeesto de nomofina vokalo ebligas senĝene almeti akuzativan sufikson, kion sisteme faras ĉi tiu teksto. Ĝia transskriba sistemo por la neplene asimilitaj nomoj distingas unuoblan a disde duobla aa. En la transskriboj ĉi tie, ĉiu alia litero havas sian Esperantan valoron. En la bengala, /a/ kaj /aa/ estas vokaloj respektive ronda kaj neronda, sen longeco-diferenco. Sed multaj aliaj baratanoj, pro siaj lingvoj, prononcas ilin kiel mallongan resp. longan /a/ ankaŭ en bengalaj nomoj. Esperantaj legantoj povas laŭ tiu kutimo prononci /a/ kiel /a/ kaj distingi duoblan /aa/ per ia longigo, traktante tiajn nomojn kiel fremdajn vortojn. Alia eblo estas simple ignori la kelklokan duobligon de /a/ ĉe la nomoj.

Dankas la tradukinto: Kvankam D ne estas la alfabetfina litero, lingvisto-tradukinto laŭprefere elektas ĉi tiun niĉon en la notoj por esprimi diversajn dankojn. Legis la traduktekston kaj/aŭ utile konsilis aŭ prihelpis Manashi DasGupta, Arikapalli Giridhar Rao, Gerrit Berveling, Gersi Bays, Jorge Camacho Cordón, Sten Johansson, Renato Corsetti kaj Claude Piron, kiu ankaŭ afable konsentis antaŭparoli. Manashi DasGupta faris (tre etajn) teksto-pliampleksigojn por plikomprenebligi la rakontan fadenon. FEL afable konsentis eldoni. La tradukinto prenas sur sin ĉiujn tradukajn kaj miskompostajn pekojn kaj antaŭdankas la publikon. Ĉe ni, antaŭ ol danci, oni riverencas la podion, kiu ebligas la aperon de la

formoj, per kiuj oni artas.

Kolofono

Titolo: Dormanta Hejmaro

Aŭtoro: Manashi DasGupta

Serio „Stafeto” n-ro 29

Kovrilo: Julia Litvinova kaj Samuel Vijay Kumar

Tekstaranĝo: Erik D’Hondt kaj Paŭl Peeraerts

ISBN: 978 90 77066 20 9

UDK: 82.3.892

NUR: 300

Leĝa depono: D/2006/2924/1

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - BE-2060 Antverpeno

www.retbutiko.be

© 2006 FEL, Antverpeno